

Jorge Camacho

Ili kaj ni

 Ili, de Léon Bergiers, eld. SAT, Leipzig, 1930, 86 p.

En 1988 aperis en la revuo *Esperanto* la artikolo de Osmo Buller *Trezorserĉe tra la librokatalogo*¹, per kiu li tiris atenton al forgesitaj juveloj, kiuj tiam ankoraŭ aĉeteblis en la libroservo de UEA. Jen citaĵo el ĝi: “Nomo, kiun la mondo maljuste forgesis², estas tiu de la belgo L. Bergiers. Apenaŭ 20-jara li kreis majstran tradukon de du noveloj de sia samlandano G. Eekhoud, *Servokapabla!* / *Marcus Tybout*, (1927; 2,70 gld.). Precipe en la unua el ili, la forte kontraŭarmeas *Servokapabla!*, oni jam sentas simptomojn de lingvaj piroteknikaĵoj, plene fajrontaj en la originala novelaro de Bergiers, *Ili* (1930)”.


Léon Bergiers naskiĝis en 1904, do li publikigis sian rakontaron estante 26-jara. En sia parto de la antaŭparolo (unuan parton skribis Dimitriv Sneĵko) li pledas por arto kiu esprimu batalemon, utilu “al la klasaj sentoj de la proletaro” kaj estu “je la servo de la Proletaro”. Tamen li informas, ke iuj rakontoj estas el la tempo kiam li verkis “realisme” (t.e. nerevolucie), kaj almenaŭ la unua peco, *Nigra kirmeso* [= kermeso], ŝajnas kongrui kun tiu dudivido. La dua rakonto, *Strika sceno*, jam prezentas bildon el la vivo de proletaj mizerfratoj, tamen iom krude kaj pamflete (cetere, ankaŭ la lingvaĵo de la tuta libro meritus ioman stilan poluron). En *Gardostaranta, Malliberejoj* k.a. el la 10 rakontoj ege trafe kaj vikle impresas la sinsekvo de frazoj kurtaj, eĉ unuvortaj.

En aliaj rakontoj, iom naiva realismo kaj la menciita pamfleteco kombiniĝas en diversaj dozoj, ĉiam kun la fono de la viktimoj de l' maljusta soci-ordo kapitalisma, de la malhumanaj urboj, de la hipokrita potenco de religio... (kio, en *La aliaj*, rezultigas pledon por la neceso de seksta edukado).

-
- 1 La tuta artikolo legeblas ĉe scribd.com/doc/53735992/Trezorserche-tra-la-libro-katalogo-1988
 - 2 Tamen ne plene forgesis, almenaŭ el nebeletra vidpunkto. Sur p. 421, noto 1 de *La danĝera lingvo* (2a eld., Progreso, Moskvo, 1990), de Ulrich Lins, legeblas ke Bergiers ekŝiĝis el la posteno de sekretario de la Kontrol-Komitato de SAT en 1931 lige kun akuzo kontraŭ Henri Jeanneret pri perfida denuncado de sovetiaj korespondantoj de SATanoj al Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU); ke, kadre de kverelo, li mem “minacis publikigi la nomojn de ĉiuj sovetaj informintoj”; kaj ke en 1932 li estis eksigita el SAT. Nek *Ordeno de verda plumo* nek *CEOLE (Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto)* de Sutton, kiuj ja pritraktas la belgan aŭtoron, mencias ion ajn pri tioj.

Ĝenerale rolas homoj ne nur suferantaj (kiel kripluloj, ftizuloj aŭ bordelulinoj) sed ankaŭ dezirantaj (vivi, esperi, ami aŭ volupti), ankaŭ memorantaj la iaman nerealecan infanaĝon, ankaŭ batalantaj ĉiu-sence, eĉ soldate en detruemaj armeoj de regnoj ĉiovoraj (“Ni oferis nian vivon por interesoj malniaj”, p. 53-54).

Kaj la aŭtoro fojfoje sin kaj nin demandas pri la principe verkista dilemo elekti inter diro kaj faro kontraŭ la burĝaro. Jam multaj jaroj pasis de tiu intermilita periodo, kiam ankaŭ Esperanto kredeble atingis sian kulminon, sed la bezono priverki la rilatojn inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj sendube restas aktuala ankaŭ hodiaŭ, negrave per kiaj rimedoj.



Nicolino Rossi

Vibroj de aŭtenta poezia sono¹

Poezio: armilo ŝargita per futuro. Komentita antologio de hispanlingva poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia, diversaj aŭtoroj, el la hispana k.a. trad. Miguel Fernández k.a., red. M. Fernández, SATeH, [Madrido], 2013, 363 p. Sen ISBN-numero.

Jen libro el kiu eferveske ŝprucas plurondaj vibroj de aŭtenta poezia sono, kiu la leganton kaj poeziŝatanton trempas mensĝue en etoso de varitonaj kaj malsamtemaj pripensialoj, pivotantaj ĉirkaŭ liberecoj, homaj rajtoj kaj ties lezoj, en oprese regata lando. La redaktoro kaj ĉeftradukinto estas la hispana bardo Miguel Fernández, pri kies poezia genia kompetento, en Esperantujo, ankaŭ ĉi-volume ni ricevas plian konfirmon. La volumo aperas kiel eldonaĵo de SAT en Hispanio (SATeH), kaj publikigis okaze de la 86-a SAT-Kongreso 2013 en Madrido kaj kiel unu el ties ĉefaj kultureventoj. Temas pri antologio de hispanlingva poezio dudekjarcenta, kunmetita el 182 poeziaĵoj de 35 aŭtoroj, kiujn iel gvidfadene kunligas la komuna socia, kontestema kaj revoluciema

1 Vd. ankaŭ la artikolon (komentarioj kaj poemekzemploj) de Miguel Fernández sur p. 97.